

ESPERANTO PROVENCE

Numéro 87 - Hiver 2011/2012

4 numéros par an

redaktoro:

Pascal Vilain

p.vilain83@orange.fr

61 montée du Castelar

83460 TARADEAU

04 94 73 33 24

kasisto:

Michel Cerisay

mcerisay@gmail.com

15 Place des Vents Provençaux

13140 MIRAMAS

baza kotizo al la Federacio (kun bulteno): 5 eŭroj

VORTO DE LA PREZIDANTO

La finiĝinta jaro 2011 estis stampita de daŭra agado en nia Federacio: sukcesaj staĝoj en Agay kaj La Ciotat, regiona kongreso en Saint-Raphaël, enhave riĉaj vojaĝoj eksterlanden de federacianoj, sen forgesi la venojn en nian Provencon de samideanoj el diversaj landoj. Do, multe da plezuraj agadoj, kiuj montras la viglon de nia movado en la regiono P.A.C.A.

Tiu ĉi numero de nia bulteno estas la unua prizorgita de nova redaktoro. Nia amikino

Renée Triolle, kiu kompetente kaj serioze plenumis la taskon dum pluraj jaroj, ja plurfoje esprimis sian intencion transdoni ĝin al alia persono. La federacia estraro jesis al la propono de Pascal Vilain transpreni la torĉon kaj tre sincere dankegas al Renée pro la farita laboro.

Kaj mi, nome de la Federacio, profitas la okazon de ĉi januara numero de nia bulteno por sendi al ĉiuj vi, karaj membroj, miajn bondezirojn por la Nova Jaro 2012.

Pierre Oliva

Attention

N'oubliez pas de payer la cotisation de 5 € à Espéranto PACA pour l'année 2012, soit par l'intermédiaire de votre groupe local, soit directement à notre trésorier, Michel Cerisay (voir son adresse ci-dessus). **Merci !**

Atentu

Ne forgesu pagi la aliĝkotizon – 5€ - al Esperanto-PACA por la jaro 2012, ĉu pere de via loka asocio, ĉu rekte al nia kasisto, Michel Cerisay (vidu lian adreson ĉi-supre). **Dankon!**

VIVO DE NIAJ FEDERACIAJ ASOCIOJ

04 – Esperanta Kulturo en Manosque

Kursoj kunigas 6 partoprenantojn, ĉiujn unuajn kaj triajn merkredojn, en « Maison des Associations » de Manosque, de la 17a ĝis la 20a.

informis José Grammatico

04 – Villeneuve-Espéranto

Ĉiulunde, de la 15a ĝis la 16a30, 6 geamikoj kuniĝas miahejme por iniciato al Esperanto.

informis Franz Mimmersheim

Indas aldoni, ke vivas, danke al la bonvolema laboro de Franz, la retejo de nia federacio « Espéranto-Provence ».

Ĉiuj vi estas invitataj viziti, komenti, pliriĉigi, kiel eble plej ofte, tiun belan ilon, kiu celas krei ponton inter la diversaj federaciaj asocioj.

Do, ni atendas vin ĉe :

<http://esperanto-provence.org>

05 - Espéranto-Gap

Jean-Louis Gobeau en la Universala Kongreso



Arlette kaj Jean-Louis dancas, Yoana muzikas

Okaze de la Universala Kongreso organizita de U.E.A. en Kopenhago (Danio) de la 23a ĝis la 30a de Julio, Jean-Louis proponis danckoncerton, vendredon la 29an, helpe de sia edzino kaj

de Yoana Strateva, bulgara koncert-violonistino. Ĉi-lasta ludis klasikajn kaj bulgarajn muzikaĵojn speciale elektitajn por tiu okazo, kies celo estas emocia kaj mensa stimulado, kiu kondukas al pli bona memkonscio kaj konscio pri la aliaj homoj. La efiko estas ne nur malstreĉiĝo kaj plibonhumoriĝo, sed la muziko ankaŭ kvietigas, helpas al koncentriĝo, sanado kaj spirita purigado. Per la dancado, montrita de Ges-roj Gobeau, la efiko estas eĉ pli granda kaj profunda, ĉar la movoj perfekte kongruas kun la ideoj enigataj en la muzikaĵojn.

Se vi iel interesiĝas pri tiu dancado, sciuj, ke okazos en Raduil (Bulgario), de la 21a ĝis la 28a de Julio 2012, unusemajna Esperanta renkontiĝo : « Muziko kaj paneŭritmo laŭ Petro Danov ».



multaj kongresanoj partoprenas en la dancado

Aktivaĵoj senpagaj – loĝejo en nova kaj komforta domo – vegetara ekonutraĵo – modelaj kostoj – pliaj informoj ĉe :

louisgobeau@yahoo.fr

Monika Arnaud en Unesko

SOCIÉTÉ Elle a participé à la conférence générale de l'Unesco

Une représentante d'Espéranto-Gap à l'Unesco

Jeuudi 8 decembre
2011
Le Dauphine Libere

HAUTES-ALPES

La 36^e session de la conférence générale de l'Unesco s'est déroulée à Paris, dans les locaux de l'Unesco, le mois dernier. Une Haut-Alpine, Monique Arnaud, y assistait.

Cette conférence a lieu tous les deux ans, le plus souvent à Paris. 194 pays en sont membres, 185 nations étaient représentées et 179 pays ont demandé la parole. A cette occasion, le Soudan Sud a fait son entrée à l'Unesco et en 2012 la Palestine viendra s'y joindre.

Monique Arnaud, secrétaire de la Fédération Espéranto Paca, représentante de cette fédération auprès d'Espéranto-France a été invitée, comme observatrice, à assister à cette conférence. Cet ancien professeur d'anglais au collège de Saint-Bonnet a enseigné l'Espéranto à ce collège (hors temps scolaire) et donne encore quelques enseignements lors de conférence au fil de ses nombreux voyages à travers le monde.

C'est avec passion qu'elle rapporte le déroulement de la conférence à l'Unesco. « Sont invités à cette conférence les ministres de l'Éducation, de la Culture, des Sports, des Sciences... de tous les pays membres. Luc Chatel, ministre de l'Éducation Nationale, de la Jeunesse et de la vie associative, représentait la France. Chaque délégation a six minutes de parole pour exposer les projets réalisés ou à réaliser dans le domaine de l'éducation et de la culture... cela dure 4 jours ! Le réchauffement planétaire à inclure dans les programmes de l'éducation, a été un thème retenu » raconte Monique Arnaud.

Les interventions ont été faites dans les six langues officielles. « Quand on l'utilise (plus de 100 congrès internationaux par an), l'Espéranto évite des traductions fort coûteuses, souvent approximatives et favorise le rapprochement entre les hommes. Il faut espérer, que dans un avenir proche, cette solution



Monique Arnaud, secrétaire de la Fédération Espéranto Paca, a été professeur d'anglais au collège de Saint-Bonnet.

se généralisera, en particulier dans les instances comme l'Unesco, qui réunit tant de nations » rajoute Monique Arnaud.

Le 15 décembre, le monde espérantiste fêtera la naissance de son créateur, Louis Lazare Zamenhof né en 1859. □

POUR EN SAVOIR PLUS
<http://esperanto-provence.org>

Monika partoprenis en la 36a sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, kiu okazis en Parizo de la 25a de Oktobro ĝis la 10a de Novembro. Delegitino de nia federacio sine de Espéranto-France, ŝi ĉeestis kiel observantino nome de tiu nacia Eo-asocio.

13 - Espéranto - La Ciotat

Kursoj okazas ĉiumerkrede en CIQ-Fontsaite, impasse Val d'Azur, avenue du Baugier.

Je la 15a : konversacio ; je la 18a : 2a-grada kurso kun 6 partoprenantoj ; je la 19a : 3a-grada kurso kun 4 partoprenantoj .

Téléthon en Le Beausset



Esperanto-budo en Le Beausset

La 3an de Decembro, kvar membroj de la Eo-klubo de La Ciotat, Loekie, Alain, Nicole kaj Pierre, partoprenis en la «Téléthon»-semajnfino en Le Beausset.

Tio ebligis al ni paroli pri nia internacia lingvo kaj montri, ke ĝi bone vivas.

Al la vizitantoj de nia budo, ni proponis ludon, kiu celis klarigi la funkciadon de nia lingvo kaj krei ĉe ili intereson, ĉar ni ja havas la projekton krei novan Esperanto-grupon en Le Beausset, kun la helpo de Pôle Saint-Exupéry.

Por ludi, estis necese aĉeti bileton (0,50€), do tiel ni ankaŭ kontribuis al helpado de « Téléthon ».

En kio konsistis nia ludo ? Sur budotablo, la kandidatoj devis elekti papereton sur kiu estis skribita radiko aŭ frazeto ; poste ili serĉis sur nia tabulo la taŭgan finaĵon aŭ la kompletan frazon... kaj gajnis bombonojn.

raportis Pierre Oliva

Novembra staĝo en La Ciotat



memoraĵo pri agrabla staĝo

La tradicia kultura semajnfino bone disvolviĝis en La Ciotat la 26an kaj 27an de Novembro.

«Bone», mi skribis, kvankam bedaŭrindaj lastminutaj problemoj malebligis al la partoprenantoj gastis en la antaŭvidita «Maison des Jumelages» kaj devigis la organizantojn – ĉefe Renée Triolle – urĝe zorgi pri aliaj kursejoj, manĝejoj kaj dormlokoj ĉe esperantistoj, amikoj aŭ eĉ najbaroj. Vera koŝmaro, do, por la organiza skipo!

Finfine, ĉio kontentige glatis. La spertuloj povis ĝui fakan prezentadon de Daniel Moirand pri la ampleksa epopeo «Mil kaj unu noktoj», literatura ĉefverko tutmonde konata kiun li majstre tradukis.

Dume, la komencantoj kaj parolemaj progresantoj ekzerciĝis en la uzado de nia lingvo danke al memfabrikataj instruludiloj prezentitaj de Rolande Cleizergues, konversaciis pere de bildoj proponitaj de Mari-Roza Vilain aŭ de demandoj pri la Esperanta vivo, elektitaj de ŝia edzo Pascal.

La diversaj grupoj, disigitaj tra la urbo pro la jam menciitaj problemoj, feliĉe kuniĝis por komunaj tag-kaj vespermanĝoj, kaj ankaŭ por foto-bildigita raporteto de Monika Arnaud pri ŝia ĉeesto en la Kopenhaga Universala Kongreso.

Dankegon al la organizantoj kaj kursestroj. Dankon ankaŭ al la partoprenintoj, kiuj sukcesigis tiun eventon, kaj ĝis la reveno en La Ciotat venontnovembre!

raportis P.V.

13 – *Espéranto-Marseille*

Kursoj okazas ĉiumarde en CIRA, 50 rue Consolat, 13001 Marseille (métro Réformés).

Je la 18a kun 2 komencantoj ; je la 19a kun 4 progresantoj.

Retejo de la asocio:

esperanto.marseille.over-blog.com

informis Renée Triolle

83 - *Esperanto-Klubo de Fréjus-Saint-Raphaël*

Kursoj okazas ĉiulunde, de la 15a ĝis la 16a30, kutime gvidataj de Jean-Claude Roger, sed fojfoje ankaŭ de Christine Graissaguel. 7 membroj partoprenas.



Kimie Markarian prezentas la sorobanon


Japano kulturo en Fréjus

London, 20an de Junio 2011, nia japandevena samideanino Kimie Markarian – loĝanta jam de pluraj jaroj en Britio – afable jesis al la invito viziti la klubon kaj kompetente klarigis la funkciadon de tipa japana kalkulilo : sorobano, al kelkaj atentaj membroj. Ŝi ankaŭ donis informojn pri la japana skribmaniero, bildigante siajn klarigojn pere de ŝialingvaj ĵurnaloj.

La grupo tre interesiĝis pri tiuj alilandaj kultureroj, tute ne kutimaj por okcidentanoj.

Plian fojon - sed tion vi jam de longe scias - Esperanto montris, ke ĝi perfekte povas ludi rolon en la aliro al alia kaj alies kulturo.

raportis P.V.



Moderna sorobano

Nia samideano kaj amiko

André Loisel diplomita!



«*Pro fidela kaj seninterrompa individua membreco de pli ol 50 jaroj*», André Loisel, ano de la grupo de Fréjus Saint-Raphaël, ricevis de Universala Esperanto-Asocio plene merititan rekompencan, nome : diplomon subskribitan de la prezidanto de U.E.A., Probal Dasgupta, okaze de la julia Universala Kongreso en Kopenhago.

De post sia emeritiĝo en 1981, André revigligis la klubon de Fréjus Saint-Raphaël en 1982, organizis la Nacian Kongreson de F.F.E.A. (Franca Fervoja Esperanto-Asocio) en 1983 kaj tiun de U.F.E. (Unuiĝo Franca por Esperanto – nun Espéranto-France) en 1987. Plie, li senlacigeble plenumis dum pluraj jaroj la postenojn de prezidanto de sia loka asocio, kursgvidanto kaj redaktoro de la bulteno Espéranto-Provence.

La tuta federacianaro tutkore gratulas lin pro tiu oficiala agnosko de longdaŭra kaj sindonema agado por nia lingvo.

Zamenhof-tago

La 18an de Decembro, dudeko da esperantistoj kuniĝis je la strato Zamenhof en Saint-Raphaël, sub la ŝildo, kiu memorigas pri la iniciatinto de nia lingvo.

Post kelkaj vortoj omaĝe al D-ro Zamenhof, la grupo direktiĝis al restoracio en Agay por komuna tagmanĝo.

Posttagmeze okazis distra programo : surprizkovertoj, rakontoj, kanzonoj, prezentado de vojaĝfilmo fare de Jean-François Cousineau.

Amika etoso, kiel kutime, stampis nian tradician feston jarfinan.

raportis P.V.

Les Raphaëlois espérantistes célèbrent le docteur Zamenhof

Le club d'Espéranto de Fréjus Saint-Raphaël a réuni ses membres, rue du Docteur Zamenhof, face à Beau Rivage. L'homme est le créateur de cette langue

Var-Matin, lundon, 19an de Decembro

Les espérantophones auront eu leurs festivités avant Noël. Hier, le club Espéranto de Fréjus Saint-Raphaël a célébré, en la présence de ses membres, l'initiateur du mouvement, Louis Lazare Zamenhof, né le 15 décembre 1859. Il ne faut pas oublier que ce médecin ophtalmologiste polonais est connu pour avoir établi les bases de la langue construite espéranto, qui comptait, en 2010, de un à deux millions de locuteurs dans le monde. Serge Debarre, est un espérantiste raphaëlois de 82 ans. Il est de tous les congrès mondiaux. Jamais il n'aurait manqué ce petit rassemblement devant la plaque de la rue Zamenhof raphaëloise, près du palais des congrès.



Langue loin d'être morte

Même sentiment du côté de Pascal Vilain, rédacteur du bulletin trimestriel d'Espéranto-Provence. « Cette date est importante pour les espérantistes, a-t-il stipulé. La vingtaine de fidèles présents ne l'ont pas contredit. Grâce à internet notamment, l'esprit du langage perdure. « Les jeunes l'apprennent en mois de six mois », assure Laurent. Celui-ci était présent, avec son amie Monique au dernier congrès

Après le rassemblement, rue Zamenhof, l'après-midi s'est poursuivie par un repas convivial à Agay.

(Photo Chanaël Chemin)

mondial qui eu lieu au Danemark. Pour le centenaire, ils étaient 6 000 à se déplacer, à Varsovie. Le prochain rendez-vous aura lieu au Vietnam. Car il ne faut pas l'oublier, être espérantiste, c'est aimer voyager. Pour les intéressés, tous les lundis, Jean-Claude Roger donne des cours à la maison des associations de Saint-Raphaël.

CHANAËL CHEMIN

L'espéranto, qu'es aquò ?

L'espéranto est une langue lancée il y a 120 ans par le médecin polonais Zamenhof. L'homme avait pour idéologie de lancer un langage compris de tous. Il fallait donc que cette langue s'apprenne très vite, sans porter de difficulté grammaticale ou d'irrégularité particulière. Ainsi, elle favorise la diffusion de toutes les cultures, sans appartenir à un pays spécifique. On estime que le nombre de personnes qui parlent l'espéranto dans le monde se situe entre deux à cinq millions.

Saint-Raphaël

var-matin
Lundi 19 décembre 2011

à partir de 32€
et votre corbeille de 13 desserts
à partir de 35€



Ĵus antaŭ la disiĝo fine de la posttagmeza programo

Reĝkuka festo

Bonvolu noti, ke ĝi okazos dimanĉon la 22an de Januaro ĉe Monik' ka Pjero Prezioso, 92 allée des Harkis en Saint-Raphaël.

Eblos antaŭe kune tagmanĝi – kaj tiam

kontribue kunporti manĝaĵon – aŭ partopreni nur posttagmeze.

Anoncu vin ĉe Monik: 04 94 83 06 88;
rete: prezmoni@hotmail.com

84 - Kultura Esperanto-Centro de Avinjono (K.E.C.A)

Trinivelaj kursoj (komencantoj, praktikantoj, spertuloj) okazas ĉiuĵaŭde de la 14a ĝis la 20a30 en la kursejo « Espace Social et Culturel La Croix des Oiseaux », rue du Tambour d'Arcole. Dekkvino da anoj partoprenas.

La asocio aperigas bultenon: «Avignon Esperanto – sendependa ligilo de la K.C.E. de Avignon»

informis Rose-Marie Quintin

Zamenhof-tago

La 11an de Decembro 2011, en la sporta centro "La Souvine", la Kultura Esperanto-Centro de Avinjono festis sian 33an Zamenhofan tagon. Matene prelegis S-ino Korĵenevskaja

Gouriou, doktoro pri filologio kaj ege kompetenta pri artoj. La temo de ŝia prelego estis : "Surrealismo kaj Salvador Dali". Ni lernis multe pri la vivo de Salvador Dali kaj aliaj pentristoj vivantaj en la sama epoko. S-ino Gouriou ilustris sian prelegon per tipaj lumbildoj de la pentraĵoj de Salvador Dali, unue en lia junaĝo kaj pli poste. Unu pentraĵo prezentis molajn hor-



S-ino Gouriou prelegas pri arto

loĝojn ; estis kvazaŭ fluantaj fromaĝ-pecoj. Sur alia videblis ovo pendigita per fadeno, ktp. La ovo, la horloĝo estas realaj objektoj sed la pentristo montras ilin en tute nereaj situacio, formo, celo. Inter la aliaj pentristoj de la sama skolo, eble la plej fame konata estas René Magritte. Unu el liaj pentraĵoj montras surprizan marvirinon, kies nuraj kruroj estas homaj. Sur alia pentraĵo ni povas vidi ŝuojn kun piedfingroj sed sen la gamboj. Tamen, tio kio plej mirigis



teatraĵo pri la Fundamento

min estas ke ia surrealismo ŝajnas multe pli malnova ol oni povas imagi. Ekzemple : praeĝiptoj skulptis statuojn, kies kapo kaj korpo ne apartenas al la samaj specioj. Horuso, la sundio, aspektas kiel homo kun kapo de falko. En antikva Egiptujo temis pri religio, pri mondkoncepto kaj ne pri surrealismo. Tamen tio vekas niajn demandojn kaj certe nian scivolemon. Dankon al Sinjorino Gouriou.

Posttagmeze, nia distra programo estis iom perturbita pro akcidenta falo de unu el niaj klubaninoj, kiu kvazaŭ eksplodigis sian pojnjon. Kirurgo operaciis ŝin kaj nun ŝi fartas bone sed ŝi bezonos multe da pacienco. Post tiu aventuro, ni malfacile retrovis la necesan atenton, koncentradon por ludi la aliajn skeĉojn. Ni kalkulas je la indulgo de nia publiko.

redaktis Rose-Marie Quintin

AGADO DE IZOLITAJ GEFEDERACIANOJ

Guillaumes (06)

Antaŭ kelkaj tagoj, Philippe Chavignon sendis al la redaktoro la jenan mesaĝon:

Saluton el Gvatemalo,

Mi restos ĉi tie ĝis la fino de Januaro kaj poste reiros al Kostariko, kie mi devas vendi mian veturilon.

Mi revenos al PACA fine de Februaro.

Mi nun havas abeluojn en la ŝtatarbaro de Esterel - almenaŭ ĝis aprilo - kaj ankaŭ kuzon kiu loĝas en Saint-Raphaël, do mi pli ofte havos okazon renkonti la esperantistojn de Var.

Mi nun estas proksime de la lago Atitlan kie mi pasigas la vintron jam de pluraj jaroj. Mi provas ĉiujare kunvenigi la malmultajn esperantistojn landskale kaj ankaŭ gvidas kursojn en la vilaĝa lernejo por junaj indiĝeninoj, kiujn mi stipendias.

*Amike,
Philippe*

Tiujn stipendiojn Philippe urĝege bezonas por daŭrigi sian agadon ; do, se vi povas kaj volas patroni indiĝeninojn, bonvolu kontakti lin:

werphatao@hotmail.com

Nice (06)

Okaze de la Zamenhof-tago en Saint-Raphaël, la 18an de Decembro, Katie kaj Jean-François Cousineau prezentis sian filmon pri vojaĝo al Indonezio.

Pro teknikaj problemoj, nur parto povis esti spektita; la resto estos verŝajne montrita dum vespero en la baldaŭa staĝo en Les Issambres.

Solliès-Toucas (83)

Kun sia kunulo kiu eklernis Esperanton, Françoise Noireau ĉeestis la kongreson de Sète, kie ŝi sukcese trapasis la KER-ekzamenon C1. Gratulojn!

Bedaŭrinde, ŝia projekto malfermi kurson en Méounes (83), kiel anoncote en la pasinta n° de la bulteno, ne povis efektiviĝi pro manko de

komunikado far la teamo, kiu dungas ŝin.

Taradeau (83)



Plia Esperanto-vilaĝo en nia regiono

La 27an de Aŭgusto 2010, la vilaĝeto Taradeau, en la departemento Var, ricevis la «Verdan Esperantan Stelon» iniciatitan de Alain Gabiller.

Tiun simblan rekompencan ĝi ŝuldas al tri es-

perantistoj, kiuj tie loĝas: Michèle Freud, Mari-Roza kaj Pascal Vilain.

Bedaŭrinde, tiu agnosko sekvis gravajn eventojn, kiuj okazis en la vilaĝo: la terurajn inundojn de Junio 2010, kaj verŝajne pro tio, la vilaĝa konsilantaro prokrastis eventualan ceremonion oficialan. Ĉar same gravaj inundoj denove trafis Taradeau en Novembro 2011, ŝajnas ke la urbestro kaj lia skipo devas plu zorgi pri tute aliaj aferoj ol akcepto de simbola diplomo. Afero sekvota, do...

Ipernity-paĝoj

- ➔ de Françoise Noireau:
www.ipernity.com/home/137187
- ➔ de Mari-Roza kaj Pascal Vilain:
www.ipernity.com/home/pascal.vilain
- ➔ ĉu aliaj havas esperantan blogon, kiu meritis vizitojn kaj komentojn?

EKSTERAJ RILATOJ - INFORMADO

«Mondissimo» en Aubagne

De la 8a ĝis la 15a de oktobro okazis en Aubagne (13) internacia forumo de alternativuloj, kiuj ne kontentiĝas pri nia nuna mondo. Diversaj budoj, prelegoj, debatoj, rondaj tabloj traktis financojn, malsaton, malriĉecon kaj similajn temojn. Ni estis avertitaj lastmomente pri tiu evento, tamen sukcesis havi budon.

La esperantistoj el La Ciotat kaj Belcodène deĵoris laŭvice por informi la preterpasantojn (junulojn survoje al la lernejo, gepatrojn kun junaj infanoj, loĝantojn de Aubagne) sed ankaŭ la deĵorantojn de aliaj budoj (ekz. Pacmovado), organizantojn aŭ engaĝitajn intervenantojn. Ni kaptis la okazon subskribigi la peticion.

Dankojn al Mireille, Loekie, Renée, Janine kaj Christian.

Venontaj ekspozicioj

Espéranto-Provence aĉetis serion de afiŝoj por prezenti Esperanton.

Bedaŭrinde, ĝi ne sufiĉe rapide cirkulas inter la grupoj. Ni do ĝojas anonci, ke vi povos ĝin vidi en Le Beausset (84) kaj en la biblioteko de Belcodène (13) dum Februaro, kie dank' al la

interveno de Janine Ratouchniak, la bibliotekistinoj planas semajnan agadon kun lerneĵanoj kaj publiko.

Radio-France / France-Inter

José Grammatico, el Manosque, tiel reagis per tuja retmesaĝo al ĵus aŭdita radioelsendo:

Bonjour. Je viens d'écouter votre émission sur Jules Verne. Avez-vous des consignes pour passer sous silence sa sympathie pour l'ESPERANTO la langue internationale neutre ? Il a été quand même président d'honneur du club d'espéranto d'Amiens. Il a écrit sur l'espéranto. Peut-être en parlerez-vous demain dans la suite ? Cordialement JG.

La respondo estis same tuja:

Bonjour,
Merci de l'intérêt que vous portez à France Inter.
Nous prenons note de votre message et nous l'avons transmis à l'émission de « La marche de l'histoire » présentée par Jean Lebrun. Cordialement.
Bérénice / Relations Auditeurs

VENONTAJ RENDEVUOJ

En nia federacio

Les Issambres (83)

Ni rememorigas al vi, ke la Mediteranea Esperanto-Semajno 2012 okazos de la 25a de Februaro ĝis la 3a de Marto en Les Issambres.

Aliĝilo estis aldonita al la antaŭa bulteno (n°86).

Marseille (13) aŭ aliloke?

Ĉu eble okazos skriba sesio de la KER-ekzamenoj en nia regiono, ekzemple en Marsejlo (sed povus esti ankaŭ aliloke...), la 9an de Junio?

Jen pria informo de la retejo <http://edukado.net>

Venis peto de pluraj asocioj kaj kluboj pri deziro okazigi KER-ekzamensesion per kiu ili ŝatus fermi sian jaran lingvokurson. Tio donus bonajn motivojn kaj celojn dum la tuta jaro por diligente lerni la lingvon kaj atingi certan nivelon.

La ekzamena komisiono de UEA studis la eblojn kaj decidis oferti tutmondan, nur skriban ekzamensesion, la 9an de Junio 2012.

La «**nur-skriba sesio**» signifas, ke post sukcesa ekzameniĝo, la kandidatoj akiros atestilon de ITK, sed nur pri la skriba parto, kaj iam, aliokaze, se ili bezonus kaj volus, ili povus trapasi nur la parolan parton pri kiu ili havos apartan atestilon. La du ekzamenpartoj kune konsistigas la kompleksan ekzamenon, sed ne necesas trapasi ambaŭ partojn por akiri atestilon.

Estroj de kluboj, grupoj kaj kursoj, kiuj volas aliĝi al la sesio okazigota en Junio 2012, bonvolu legi la pli detalajn informojn kaj kondiĉojn kaj kontakti la komisionon ĉe KER-ekzamenoj@edukado.net.»

Se vi ankoraŭ ne estas plene konvinkitaj pri la neceso trapasi tiun sesion, eble aŭskultado de reklamkanzono kapablos persvadi vin.

Nia fama samideano-kanzonisto JoMo ja verkis tekston kaj melodion por reklami pri la Monda Skriba Ekzamensio de KER. Katalin Kováts, el la ĝisnunaj ekzamenfotaj kaj filmoj, muntis filmeton. La tuto estis premiere prezentita la 26an de Novembro 2011, dum la malferma tago en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo.

Edukado.net aldonis: «Ni esperas, ke la

melodio longe restos en viaj oreloj kaj je la taktoj ne nur la piedoj, sed ankaŭ viaj manoj ekmoviĝos... kaj vi tuj aliĝos al iu sesio.»

Por aŭskulti tiun kanzonon, sekvu la jenan ligon: <http://youtu.be/8qQoLY9h9a0>

Se io okazos sine de la Provenca Federacio, vi kompreneble estos informitaj.

Romans (26) – rilate kun nia federacio

Nia Federacia Kongreso iĝos ĉijare Regiona Kongreso, kune kun la najbara Rodanalpa Federacio, kaj okazos en Romans-sur-Isère la 22an, 23an kaj 24an de Junio, kie la klubo « Bona Stelo » festos sian 100an datrevenon de kreado. Estas antaŭvidita koncerto de JoMo.

Bonvolu de nun zorge noti tiun daton sur vian agendon. Pli da informoj kaj aliĝilo en la sekva bulteno.

En Francio

Februaro 25

➔ 6a unutaga staĝo en Besain (Ĵuraso)
rete: emmanuel.desbrieres@orange.fr

Aprilo 14-21

➔ Printempa Semajno kun ILEI en Grezjono, Francio

Preparado por KER-Ekzameno

Inf.: Esperanto-Kulturdomo, Château de Grésillon, FR-49150 Saint-Martin d'Arce, F.

rete: kastelo@gresillon.org

Aprilo 21-28

➔ Fringoj por infanoj en Grezjono, Francio
Inf.: Esperanto-Kulturdomo, Château de Grésillon, FR-49150 Saint-Martin d'Arce, F.
rete: kastelo@gresillon.org

Aprilo-Majo 27-01

➔ Krokodila Renkontiĝo 2012 en Arrout – Francio

4 tagoj da umado en Pirenea montara vilaĝo
Inf.: Christophe Chazarein, 98 rue Riquet, FR-31000 Toulouse, Francio
rete: krokodila2012@gmail.com

Aprilo 23-28

➔ Plurnivela linva staĝo en Nilvange (Moselle)

<http://www.esperanto-thionville.ass0.fr/>

Majo 25-29

➔ Nacia kongreso en Saint-Aignan (apud

Nantes)

www.esperanto-france.org

(sed neniu plia informo trovebla sur tiu retejo fine de Decembro)

Ekster nia lando, sed ne tro malproksime

Februaro 22-24 - Hispanio

→ Esperanto-konferenco en Alikanto. Antaŭ (18-19) kaj postarangoj (25-26)

Inf. ; Verde Vivi, Quersstr. 11, DE-66287 Quierschield, Germanio

rete : drfjd@web.de

Marto 7-11 - Italio

→ Bibliaj tagoj en Trente, Italio

rete : stefanlepping@gmx.de

Aprilo 4-10 - Italio

Internacia Junulara Festivalo en Cattolica, Romanjo.

Temo : Novaj lingvaĵoj por novaj komunikiloj ; de Leibniz al Zuckerberg, tra Turing

Aprilo 5-12 - Germanio

→ 3a Printempe en Marienburg, Zell/Mosel, Paskaj tagoj en belaj domo kaj pejzaĝo !

Inf. : EsperantoLand, Lu Wunsch-rolshoven, Wicelstr. 9,2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin, Germanio

rete : lu.esperantoland@gmx.de

Aprilo 20-22 - Britio

→ 107a Skota kaj 93a Brita kunkongreso de Esperanto en Edinburgh, Britio

Aprilo-Majo 27-01 - Hispanio

→ 71a Hispana Kongreso de Esperanto en Almagro, Hispanio

Inf. : Esperantista Kastili-Manĉa Asocio kaj Hispana Esperanto-Federacio

rete : info@esperanto.es

Aprilo 28 - Nederlando

→ 36a Malferma Tago de la Centra Oficejo en Roterdamo, Nederlando

Prelegoj, libroprezentoj, filmoj : ĉio iel ligita al la 50a datreveno de la ekfunkcio de la Centra Oficejo en ties nuna domo.

Inf. : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando

rete : uea@co.uea.org

Aprilo-Majo 28 -01 - Belgio

→ 2a Beneluxa Eo-Kongreso en la proksimeco de Namur, Belgio

rete : doumontvalere@yahoo.fr



Se vi ne havas la eblon partopreni en Eo-eventoj eksterlande, ne forgesu, ke ĉiam estas plaĉe praktiki koresponde nian lingvon kaj tiel flegi tutmondajn amikajn rilatojn.

(Pliaj informoj pri tiu poŝtmarko iniciatita de "Fédération Espéranto Rhône-Alpes" en la venonta numero de nia bulteno.)

LA FEDERACIANOJ ESPRIMAS SIN...

Prozpoeme

Bonan jaron !

Plene ĝuu ĉiun tagon de la jaro 2012 !
La mondo renaskiĝu por vi ĉiun matenon !
Estu feliĉaj por feliĉigi la aliajn, kaj precipe mal-
avare amu. La amomanko elvokas dezerton sen
oazo ; rozon, kiu senfoliiĝas, triste velkintan.
Lernu sekvi la konsilojn de Rosa Luxemburg :
« *Kiam oni havas malbonan kutimon serĉi vene-
nan guton en ĉiu floro, oni trovas ĝis sia morto
iun kialon por lamenti. Do, prenu la aferojn sub
la mala angulo kaj serĉu mielon en ĉiuj floriĝoj ;
vi ĉiam trovos ian kialon de serena ĝojo...* »
Ne atendu, ke malsano aŭ akcidento senmov-
igas vian korpon por ekkonscii, ke vi havas gam-
bojn por esplori la mondon ; okulojn por ekstaz-
admiri la belaĵojn de la naturo ; manojn por
karesi, krei belecon kaj bonecon ; orelojn por
precipe aŭskulti la aliulojn, iliajn dolor-kaj ĝoj-
kriojn. Trinku ĉe la fonto de la bona humoro, de
la gajeco. Tiel kiam vi travivos afliktaĵojn, vi pov-
os ĉerpi el viaj lumaj trezoroj...

Ni kune penu por ŝanĝi la pluvguton en kristal-
bulon ; por transformi la malamon en amon, la
egoismon en altruismon, la indiferentecon en
komprenon. Ni esperu, semante senlace la flo-
ron de l'amikeco kaj de la paco.

Kun la franca poeto Georges Cathalo mi diras :
« *Malbonan jaron al la milito ; al la morto ; al
ĉiuj tiranoj, diktatoroj, torturistoj ; al ĉiuj mal-
purigistoj. Malbonan jaron al la virusoj, bakte-
rioj, venenaj gasoj, acidaj pluvoj, radioaktivaj
ruboj...* »

Antaŭ ol fini, mi havas apartan penson por la
malsanuloj, handikapuloj, ekzilintoj, malsatuloj
kaj la malbonamataj uloj. Mi sopiras esti suno
por varmigi ilian koron, heligi ilian vizaĝon.

Mi dezirus, karaj geamikoj, ke la vortoj de miaj
bondeziroj florigu l'asfodelon en via korgarde-
no...

Michèle Freud

cerbume...

Funkcii / Sukcesi

En suplemento de la franca magazino Téléràma
(n° 3230 de la 7a de Decembro 2012) min trafis
la jenaj vortoj : « la desegnarto, sola Esperanto,
kiu iam funkciis », (« le dessin, seul espéranto
qui ait jamais fonctionné »), en recenzo pri ver-
ko de Louis-Antoine Prat, « La franca desegn-
arto en la XIXa jarcento » (« Le Dessin français
au XIXème siècle » - éd. Louvres/musée d'Or-
cay/Samogy). Tiu sentenco pri Esperanto estas
citaĵo eltirita el la prefaco de la libro, skribita de
L. A. Prat mem.

Mia unua reago estis iel supraĵa : kiel facilas
eldiri antaŭjuĝon sen iu ajn kono pri la aludita
temo, des pli se tuja rebato ne eblas, ekzemple
se temas pri definitiva verdikto en ĵurnalo, re-
vuo aŭ libro ! Laŭdire, tiu aŭtoro estas
« gravulo » : kolektisto, verkisto, komisiito pri
grafikaj artoj ĉe la Louvres-muzeo kaj unu el la
instruistoj de la samloka kaj samnoma faklern-
ejo. Senduba specialisto pri desegnoj, mi tuj
pensis, sed ne pri lingvoj. Kaj mi tiel emis kon-
kludi : « Fakulo faku pri sia fako, sed ne perme-
su al si fifaki pri aliaj fakoj. »

Bone. Sed feliĉe, post senpripensa reago de la
dekstra cerebra hemisfero, ofte sekvas pli racia
vidpunkto diktita de la maldekstra, ĉifoje help-
ata de saĝa opinio de mia edzino : skribinte pri
ŝajna antaŭjuĝo de nekonata persono, ĉu an-
kaŭ mi antaŭjuĝis ? Ĉu mi rajtas definitive
kondamni iun, de kiu mi legis nur parteton de
teksteto ? Ĉu mi ne devus pli profunde provi
ekscii, kiun sencon donis L. A. Prat al la verbo
« fonctionner » ?

Mi hezitis inter du traduksolvoj por tiu vorto :
« funkcii » aŭ « sukcesi ». Se Prat celis
« funkcii », li certe eraras : nia lingvo ja kontent-
ige funkcias. Ĝi ebligas ĉiutemajn konversaciojn,
ĝi kunigas praktikantojn en multaj kursejoj,
renkontiĝejoj, staĝoj, kongresoj... Se li celis
« sukcesi », la afero iĝas pli diskutebla : ĉu niaj
francaj sinsekvaj ministroj pri edukado jam
agnoskis nian lingvon ? Ĉu la nuna kampanjo
« Esperanto ĉe la abiturienta ekzameno » atin-
gos sian rolon ? Ĉu la Eŭropaj instancoj iam
uzos Esperanton ? Ĉu la radiaj, televidaj, kom-
putilaj programoj iam kapablos vivi pli ol nur
dum kelkaj monatoj aŭ jaroj ? Ekzemple, ĉu la
novaĵportalo Eventeo sukcesas, eĉ se ĝi sendu-

be funkcias ? Ĉu nia lingvo, kiu ja funkcias, finfine estas sukceso ?

Plian fojon, evidentiĝas, ke tre gravas la vortaj signifoj. Unue bone difini vorton, poste diskuti.

Kaj same evidentiĝas, ke neniam taŭgas senprokrasta kaj senpripensa rebato.

Sed eble alias via vidpunkto. Ne hezitu reagi !

Pascal Vilain

pripensige...

Schwartz-a parolado

Multaj Eo-asocioj verŝajne festis, ĉirkaŭ la 15a de Decembro, la datrevenon de la naskiĝtago de Zamenhof. Pri tiu kutimo, jen vortoj de la famkonata (almenaŭ de ni, esperantistoj) romanisto Raymond Schwartz, kiujn li prononcis okaze de Zamenhof-festo. Mi konas nek la lokon, nek la daton de la ĉi-sekva parolado, sed scias, ke Roger Bernard, kiu verŝajne registris ĝin, afable disponigis la dokumenton al L.F.Koop. kiu ĝin surbendigis en 1993 sur kasedo (Songazeto 11). Mi kopiis la paroladon, aŭskultante la kasedon.

Kompreneble, la tuto estis dirita por ridetigi la tiaman ĉeestantaron – vi ja konas Schwartz, ĉu ne ? – sed... tamen...

« Ni, esperantistoj, kunvenas ĉiujare por festi la datrevenon de la naskiĝtago de Doktoro Zamenhof. Bone. Kaj mi, post longa meditado, bedaŭris tion. Eble tio sonas en viaj oreloj kiel sakrilegio, ĉu ne ? Ke homo, « normala » esperantisto, povas bedaŭri, ke ĉiujare la esperantistoj festas la datrevenon de la naskiĝtago de Doktoro Zamenhof !

Kial festi lian tagon ? Nu, verŝajne ĉar ni konsideras lin, tute prave, kiel grandan viron. Ni festas lin ankaŭ ĉar li faris al la homaro la donacon de genia eltrovaĵo. Bone ! Kaj nun, mi demandas min : ĉu nur Zamenhof en la tuta mondo eltrovis ion genian, kiu estas utila por la homaro ? [...] Ĉu laŭ via opinio la telefono estas io utila ? ... Ĉu oni uzas la telefonon ?... En la vivo, mi pensas, ke ĝi faras al ni grandajn servojn. Se mi ĝuste memoras, inter la inventistoj de l'telefono, estas iu S-ro Bell, Graham Bell... Kiu estas la naskiĝtago de S-ro Graham Bell ? Kiam oni festas lian naskiĝtagon ?

[...]

Estas tiom da inventistoj, grandaj homoj, geniaj homoj, kiuj faris tre utilajn servojn. Ni prenu inter la lastaj, ekzemple, Pasteur, Fle-

ming kiu inventis la penicilinojn. Sen penicilino, vi estus jam verŝajne mortintaj !... Kial ne ?... Kaj kiam oni festas la datrevenon de la naskiĝtago de S-ro Fleming ? ... ?

Kion konkludi ?

Mi supozas, ke de la momento kiam la donaco de granda homo sukcesis, estas universale akceptita, oni definitive forgesas la inventiston. Kaj tial mi diris : mi bedaŭras, ke oni ankoraŭ festas la datrevenon de D-ro Zamenhof, ĉar tio signifas, ke kiam oni ne plu festos, la tuta mondo uzos Esperanton.

Kaj tio finfine estas la celo de nia movado, ĉu ne ? »

Pripensinda ?...

Pascal Vilain

Raymond Schwartz




juna ...



... kaj iom malpli juna, en la filmo « Angoroj »

Iom da humuro...



« Panjo, kial tiuj homoj grimpas kaj falas, anstataŭ uzi la vojon ?
- Ili estas homoj, kiuj rifuzas uzi la bonan vojon, ĉar ĝi estas artefarita. »

(Tiu bildo, aperinta en Heroldo de Esperanto n° 1210 la 1an de Aprilo 1955, venas el « Europa ruft Dich » - Germanio. La montoj simbolas la diversajn Eŭropajn lingvojn ; eblas legi : hispana, itala, franca, portugala, angla, novgreka, sveda, nederlanda, dana).

Limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta numero :

15a de Marto 2012

Bonvolu sendi al : p.vilain83@orange.fr

Antaŭdankojn pro viaj kontribuaĵoj !